

& La ranoj volas reĝon:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 319 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per melodio kaj rekantaĵo de Drako Longa, Norda Kantaro #4414 kaj disduigo de versoj (;).>

(#Melodio:

<:29> (

/mi mire redo doodo;do dodo dore mi; mi mire mire mimi; soso fami mi;

(#Rekantaĵe: redo re rere mire do rere re; rere mire doTi LaSo So LaTi do o)

)×11)+

(&Strofoj:

'1 /La tutan marĉon havis ; por si la rana gent'. ; Libere ili vivis, ; tamen sen kontent'.

(×: **Bruas danco en halo, dancu en ĉen'!** ; **Ĝojaj paŝas ni en esperanto-kunven'**.)

'2 Jupiteron ili tedis ; per petega preĝ' ; por la ricevo de ; moral-firmiga reĝ'.

'3 Jupitero, ride, ŝtipon ; ĵetis el la alt'. ; Kun ega plaŭdo ĝi falis. ; Hu! Per tima salt'

'4 rifuĝis nun de sia ; reĝo la popol', ; kaj longe kaŝis sin ; sub dika marĉtavol'.

'5 Elŝovis fine la kapon ; tamen unu ran', ; rigardis, vidis, poste ; al la kvaka klan'

'6 rakontis, ke la reĝo ; terura estas ŝtip'. ; Sen timo venis tuj ; vetnaĝe la tuta trib',

'7 sursaltis ili la ŝtipon ; aŭ surrampis ĝin, ; eĉ, malhonore per sia ; koto stampis ĝin.

'8 Kaj ili Jupiteron petis ; nun pri nova reĝ' ; anstataŭ la sentaŭga, ; ĉar senpova reĝ'.

'9 Nu, venis nova reĝo, ; sed estis, ve, serpent', ; komencis ilin ekstermi ; per venena dent'.

'10 Nenie savo! Morta ; silento kaj terur'! ; Sekrete ili petis, ; pere de Merkur',

'11 Jupiteron, helpi. Sed li ; estis sen kompat' ; "Ne plaĉis bona, plaĉu ; la malbona stat'!")